Esperanto:

Gazetara komuniko de septembro 2020:

PRI LA PROBLEMO DE LA SISTEMECA PRISILENTADO DE LA KUNLABORO DE DETLEV BLANKE KUN LA MINISTERIO DE LA ŜTATA SEKURECO DE GDR EN LA ESPERANTO-MOVADO

Kvankam oni neniam parolis pri ĉi tiu tikla temo publike, en diversaj cirkloj de la Esperanto-movado oni ĉiam suspektis, ke Detlev Blanke estis plej verŝajne (neoficiala) kunlaboranto de la Ministerio de la Ŝtata Sekureco de GDR, ankaŭ se oni ne povis pruvi tion pro manko de oficialaj dokumentoj. Neniu esperantisto volis aŭ kuraĝis publike paroli pri tiu ĉi temo, do ĝi restis tabuo dum jardekoj.

Kvankam lia libro pri la historio de la Esperanto-junularo en GDR, aperinta en 2011 en germana eldonejo, entenis ĉapitron pri la rolo de certaj GDR-esperantistoj kunlaborintaj kun la menciita ministerio (kutime nomata „Stasio"), la (orient-berlina) aŭtoro Torsten Bendias ne traktis la problemon de la kunlaboro de Blanke kun ĝi. Ĉar Blanke estis menciita de Bendias kiel „mentoro" en Esperanto-aferoj, li probable ne povis esti tute malferma rilate al la kazo Blanke, kiun li simple ne traktis en sia libro, tial ke li devas esti konsiderata kiel partieca. Estas tamen malverŝajne, ke Bendias, kiu esploris aktojn de BStU rilate GDR-esperantistojn, nenion sciis pri la kunlaboro de Blanke kun la Stasio, ĉar tiuj aktoj estas esencaj por Esperanto kaj neeviteblaj por ĉiuj, kiuj volas studi ĉi tiun temon. (Pli detale vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Recenzo_Bendias_GDRjunularo.pdf).

En sia ampleksa libro pri la historio de la Kulturligo de GDR, aperinta en 2013, Andreas Zimmer unuafoje oficiale menciis, ke Detlev Blanke kunlaboris kun Stasio sub la kaŝnomo „IM ulo". IM signifas „neoficiala kunlaboranto". „Ulo" estas sufiksa vorto en Esperanto kaj povas signifi homon, viron k.s.

Ĉu tiu mencio estis rimarkita de iu esperantisto, kiu interesiĝis pri ĉi tiu temo kaj ´devis´ koni la novaĵon, ne estas konata. Sed oni devas supozi, ke iuj esperantistoj, kiuj interesiĝis pri ĉi tiu afero kaj ´devis´ scii ĝin, ĉar tia novaĵo kutime ne restas neatentata de tiaj personoj, verŝajne sciis ĝin (ekzemple Lins aŭ Fiedler), sed kaŝis la informon antaŭ la publiko, ĉar oni ne volis diskonigi ĝin inter la esperantistaro. Tial ĉi tiu fakto restis longe nekonata kaj estis kvazaŭ la sekreto de tiuj, kiuj sciis ĝin, ĉar neniu devis scii ĝin krom ili, despli ke Blanke mem dumvive prisilentis ĝin.

Surbaze de la sekvaj kazoj kaj ekzemploj oni povas tute klare konkludi, ke la sistemeca prisilentado de la kunlaborado de Blanke kun la Stasio okazas, ĉar tiu informo reprezentas maldezirindan scion, kiun oni tutsimple celas sistemece subpremi kaj intence kaŝi.

Kvankam Vikipedio kutime aldonas al la Esperanto-paĝoj senprokraste ĉiujn eblajn pli malpli gravajn kaj bagatelajn novaĵojn, la informo pri la kunlaboro de Blanke kun Stasio ĝis nun neniam estis aldonita en la biografio pri Blanke, kvankam la fakto estas konata ekde 2013.

Kiam Blanke neatendite forpasis en somero 2016, en la nekrologoj, kiuj estis ĉefe glorigaj, admiraj kaj adoraj (unu el ili originis de Lins), oni povis legi neniun mencion pri la kunlaboro de Blanke kun la Stasio. Ankaŭ en la multnombraj kondolencoj esprimitaj de amikoj kaj admirantoj de Blanke kaj membroj de la „Societo por interlingvistiko" (GIL, orienta Berlino) oni povis legi neniun aludon pri tiu politika rolo de Blanke, ĉar evidente neniu emis aŭ kuraĝis tuŝi ĝin. Tial ne povis ekesti (kritika) biografio de Blanke, kiu enhavus ian informon ligitan kun lia Stasio-kunlaboro. Kaj tiel estas nature, ke ankaŭ la koncerna biografio de la (scienceca) enciklopedia libro „Nia diligenta kolegaro" (2018), verkita de rusaj aŭtoroj, kiuj konsideras Blanke unika Esperanto-korifeo, enhavis neniun indikon pri tiu fakto.

Ankaŭ en iu kontribuaĵo de Thomas Bormann, okcidentgermana esperantisto kaj ĵurnalisto de la germana radio, al iu festlibro por U. Lins de 2018, en kiu li traktis kelkajn kazojn de la kunlaboro de GDR-aj esperantistoj kun la Stasio, la kazo de Blanke ne estis menciita, kvankam la aŭtoro konsultis ĉi-koncernajn BStU-aktojn kaj estis probable informita pri ĉi tiu kazo.

En junio 2019 Andreas Künzli (Svislando) publikigis ampleksan dokumentaron, kiu pruvis sen dubo la multjaran kunlaboron de Blanke kiel „IM ulo" kun la Ministerio de la Ŝtata Sekureco de GDR. (vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Stasi_Ulo.pdf). Ĉi tiu dokumentaro, kreita post la studado de ĉi-koncernaj aktoj, estas ĝis nun nete prisilentata de la publicaj organoj de la Esperanto-movado kaj ankaŭ ne aperis en la bibliografioj de la Esperanto-movado (kiuj kutime registras ĉian „fatrason").

La Stasi-kazo Blanke restis netraktata ankaŭ de duonoficialaj retgazetoj kiel „Libera Folio“ (redaktata de /iama/ finna komunisto) aŭ „La Ondo de Esperanto“ (redaktata de konservativaj patriotismaj rusoj), kiuj senprokraste kaj redunde provizas sian legopublikon per ĉiuj eblaj pli malpli signifaj novaĵoj kaj „skandaloj“ de la Esperanto-movado, kvankam tiuj organoj konas la kazon, ĉar ili estis ricevintaj la ĉi-koncernajn informojn.

Ankaŭ en iu kontribuaĵo de la retinformilo de la berlinaj esperantistoj, en kiu Blanke estis plurfoje menciita en la kunteksto de sia agado antaŭ 50 jaroj en 1970, mankis mencio pri lia kunlaboro kun la Stasio (vd. https://esperanto.berlin/de/eo-ddr-1970), kvankam la aŭtoro de tiu artikolo konas la kazon, sed evidente li intence rezignis inkluzivi ĝin. Anstataŭ tio, li verve emfazis la (dubindajn) „meritojn“ de Blanke sur la kampo de la klerigo kaj edukado de la socialisma homo en GDR. Legante la kontribuaĵon, oni volenevole sentas sin reĵetita en la tempon de la GDR-propagando.

Por la koncerna tempo oni legas en la aktoj de la Stasio kun dato de la 26a de februaro 1970 la sekvantan noton de la Popola Polico de GDR (kunlaboranta kun la Stasio):

„[Detlev Blanke] estas membro de la SED kaj konstante reprezentas la politikon de la partio kaj registaro. En la ĝisnuna kunlaboro [li] raportis honeste pri la [por ni] interesaj aferoj de la Esperanto-movado en GDR. En sia antaŭa laboro [li] disponigis libervole informojn pri esperantistoj negative aperantaj en la internacia skalo. En la antaŭa kunlaboro [li] estis fidinda kaj honesta. Lia rilato de la konfido kun la Ministerio de la Ŝtata Sekureco estas bona.“ (traduko el la germana de aK).

Demandinte la aŭtoron de tiu kontribuaĵo en la berlina retforumo, kial li ne menciis la kunlaboron de Blanke kun la Stasio, kvankam li ja konas la kazon kaj la historio estas bone dokumentita, oni ricevas de tiu flanko jenan respondon: „Ne ekzistas kialo trakti la temon, tiel longe ke la kontraŭ-komunisma ĉasado daŭras, ĉar la celo ne estas sincera traktado de la temo, sed nur kontraŭ-komunisma ĉasado, ĉe kiu oni surtretas la kadavron“ de la viktimo. Ĉi tiu stranga respondo imprese ilustras la mensan staton de homoj, kiuj politike apartenas al la malnova ultra-reakcia komunisma spektro. Evidente ili sentas la bezonon protekti siajn iamajn kamaradojn kaj prisilenti ties kunlaboron kun la Stasio.

Oni do fine povas konstati kaj observi, ke en la tuta UEA-movado kaj preter ĝi ĉi tiu temo estis/as sistemece, rigore kaj obstine prisilentata, kaj ke oni strange reagas, kiam oni estas alfrontata kun tiu ĉi historio. Tiu neracia kaj malhonesta sinteno nature malhelpas ĉian kritikan prilaboradon de la Esperanto-historio, kiu restos sur la nivelo de la fabeleca legenda propagando (eĉ sciencaj verkoj estas koncernataj de tiu malsano), kies solaj celo kaj intenco estas trompi la senscian publikon. La Esperanto-movado aplikas en principo la saman strategion kiel siatempe la komunistoj de la orienta bloko: Obstine kaj rigore prisilenti ĉiujn proprajn problemojn, kiuj povus damaĝi la propran reputacion kaj diskrediti la propran partion, rifuzi ĉiun kritikon de interne kaj ekstere, tordi la aferojn kaj turni la lancon okaze de riproĉoj flanke de (internaj kaj eksteraj) kritikistoj. Ĉi tiu ruza strategio estas aplikata por defendi sin kaj la proprajn kamaradojn antaŭ „kalumnio“, kvankam tiuj homoj scias, ke ĝi estas falsa kaj mensoga.

Tiel oni devas supozi, ke la kunlaboro de Detlev Blanke kiel „IM ulo“ kun la Ministerio de la Ŝtata Sekureco de GDR estos probable ankoraŭ pli longe prisilentata de la Esperanto-movado. La kialo de la prisilentado estas verŝajne, ke a) oni hontas konfesi, ke Blanke estis spiono kaj komplico de la Stasio (kiel konate, por la komunistoj ĉiam estis embarase konfesi proprajn erarojn), kaj b) ke oni ne deziras makuli la honoron de unu el la plej meritplenaj ikonoj de la Esperanto-movado per malpuraĵo. Tiu sinteno koncernas precipe la germanajn esperantistojn, sed ankaŭ la gvidajn aktivulojn de UEA, kies honora membro Blanke estis, sen scii, ke li estis ankaŭ agento de la Ministerio de la Ŝtata Sekureco de GDR (kvankam, kiel dirite, oni supozis ĝin). Ke Blanke sistemece subpremis la liberecon, t.e. malhelpis la liberan agadon de la Esperanto-movado en GDR en la nomo de la SED-reĝimo kaj per la rimedoj de la Stasio, pri kio eĉ Bendis lamentis, tion oni tre bone sciis, sed oni neniam kritikis ĝin, ĉar oni reprezentis la opinion aŭ estis firme konvinkita, ke en GDR Blanke faris „ion bonan“ por Esperanto. Tio estis la skandalo, aŭ la ludo.

© www.planlingvoj.ch, sept. 20

Deutsch:

Pressemitteilung vom September 2020:

ZUM PROBLEM DES SYSTEMATISCHEN VERSCHWEIGENS DER ZUSAMMENARBEIT DETLEV BLANKES MIT DEM MINISTERIUM FÜR STAATSSICHERHEIT (MfS) DER DDR IN DER ESPERANTO-BEWEGUNG

Obwohl man in der Öffentlichkeit niemals über dieses heikle Thema sprach, wurde in Kreisen der Esperanto-Bewegung immer vermutet, dass Detlev Blanke sehr wahrscheinlich ein (inoffizieller) Mitarbeiter des Ministeriums für Staatssicherheit der DDR war, auch wenn man es aus Mangel an offiziellen Dokumenten nicht beweisen konnte. Kein Esperantist wollte oder getraute sich darüber zu reden, so dass das Thema während Jahrzehnten ein Tabu blieb.

Obwohl sein Buch über die Geschichte der Esperanto-Bewegung, erschienen 2011 in einem deutschen Verlag, auch ein Kapitel über die Rolle gewisser DDR-Esperantisten und ihre Mitarbeit mit dem besagten Ministerium (kurz: Stasi) enthielt, wurde das Problem der Zusammenarbeit Blankes mit der Stasi vom Verfasser Torsten Bendias nicht behandelt. Da Blanke von Bendias in Esperanto-Angelegenheiten als „Mentor“ bezeichnet wurde, konnte er den Fall Blanke wohl aus persönlichen Gründen nicht offen angehen und liess ihn einfach aus, weshalb man ihn, Bendias, bezügl. dieses Falles wohl als befangen betrachten muss. Aber es ist wohl unwahrscheinlich, dass Bendias, der die Akten der BStU über die DDR-Esperantisten untersucht hat, nichts über die Zusammenarbeit Blankes mit der Stasi gewusst hat, denn die Blanke-Akten der BStU sind für Esperanto von zentraler Bedeutung und wohl unvermeidlich für jeden, der/die sich mit dieser Thematik beschäftigen will.

Erstmals hat Andreas Zimmer in seinem umfassenden Buch über den Kulturbund der DDR, erschienen 2013, offiziell erwähnt, dass Detlev Blanke unter dem Tarnnamen „IM ulo“ mit der Stasi zusammengearbeitet hatte. IM (bedeutet „Inoffizieller Mitarbeiter“, „ulo“ ist ein Esperanto-Wort und bedeutet Kerl, Mann, Mensch u.ä.).

Ob diese Erwähnung von irgendeinem Esperantisten, der sich für diesen Sachverhalt interessierte und die Neuigkeit kennen sollte, bemerkt und zur Kenntnis genommen wurde, ist unbekannt. Es ist aber zu vermuten, dass einige Leute in der Esperanto-Bewegung, die dies interessierte und wissen sollten, denn eine solche Neuigkeit bleibt bei diesen Personen gewöhnlich nicht unbeachtet, davon wahrscheinlich Kenntnis hatten (z.B. Lins oder Fiedler), die Information aber einfach verschwiegen und der Öfentlichkeit vorenthalten, denn sie sollte beim (Esperanto)-Publikum nicht verbreitet werden. So blieb diese Tatsache lange Zeit unbekannt, ja sogar eine Art Geheimnis bei denen, die es wussten, denn niemand ausser ihnen sollte es wissen, zumal Blanke selbst sein Leben lang dazu geschwiegen hatte.

Aufgrund der folgenden Fälle und Beispiele lässt sich ganz klar schlussfolgern, dass das systematische Verschweigen Blankes als Mitarbeiter der Stasi deshalb stattfindet, weil diese Information unerwünschtes Wissen darstellt, das man ganz einfach bezweckt, systematisch zu unterdrücken und absichtlich zu verbergen.

Obwohl Wikipedia seinen Seiten über die Esperanto-Bewegung gewöhnlich unverzüglich alle möglichen wichtigeren und weniger wichtigen Neuigkeiten hinzufügt, wurde die Information über die Zusammenarbeit Blankes mit der Stasi auf der entsprechenden Seite zur Biographie Blankes bis dato nicht hinzugefügt, obwohl die Tatsache seit 2013 bekannt ist.

Als Blanke im Sommer 2016 unerwartet verstarb, konnte man in den Nekrologen, die meist einen glorifizierenden Charakter aufwiesen (und von denen einer von Lins stammte), keine Erwähnung der Zusammenarbeit Blankes mit der Stasi finden. Auch in den zahlreichen Kondolenzschreiben der Freunde und Bewunderer Blankes und Mitglieder der „Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL, Ost-Berlin) konnte man keine Andeutung über diese politische Rolle Blankes lesen, denn offenbar hatte niemand Lust oder getraute sich niemand, das Thema zu berühren. So konnte keine (kritische) Biographie Blankes entstehen, die eine Information über die Verwicklung Blankes als Stasi-Mitarbeiter enthalten hätte. Und so ist es natürlich, dass auch in einer (wissenschaftlichen) Enzyklopädie wie „Nia diligenta kolegaro“ (2018), verfasst von russischen Autoren, die Blanke als Esperanto-Koryphäe betrachten, kein Hinweis zu diesem Sachverhalt zu finden war.

Auch in einem Beitrag von Thomas Bormann, s.Z. westdeutscher Esperantist und Journalist des SWR, der in einer Festschrift für Lins von 2018 einige Fälle der Zusammenarbeit von DDR-Esperantisten mit der Stasi behandelt hatte, blieb der Fall Blanke unerwähnt, obwohl der Autor vermutlich darüber Bescheid wusste, da er ebenfalls diesbezügliche Akten der BStU konsultierte.

Im Juni 2019 veröffentlichte Andreas Künzli (Schweiz) eine umfangreiche Dokumentation, die die langjährige systematische Zusammenarbeit Blankes als „IM ulo“ mit dem Ministerium für Staatssicherheit der DDR zweifellos belegte. (vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Stasi_Ulo.pdf). Dieser Schriftsatz, entstanden nach einem Studium einschlägiger Akten, wurde bisher von keinem Organ der Esperanto-Bewegung erwähnt oder zitiert, und er erschien auch in keiner Bibliographie der Esperanto-Bewegung (wo sonst allerlei Firlefanz und Schnickschnack festgehalten wird).

Auch in offiziösen Presseorganen der Esperanto-Bewegung wie „Libera Folio“ (redigiert von einem /ehemaligen/ finnischen Kommunisten) oder „La Ondo de Esperanto“ (redigiert von konservativen patriotischen Russen), die ihr Lesepublikum unverzüglich und redundant mit allen möglichen mehr oder weniger bedeutenden Neuigkeiten und „Skandalen“ der Esperanto-Bewegung versorgen, wurde der Stasi-Fall Blanke bisher nicht aufgegriffen, obwohl diese Organe von diesem Fall Kenntnis haben und die entsprechenden Informationen erhalten haben.

Auch in einem Beitrag des Online-Forums der Berliner Esperantisten, in dem Blanke im Zusammenhang mit seiner Tätigkeit vor 50 Jahren gewürdigt wurde, fehlte ein Hinweis über seine Zusammenarbeit mit der Stasi (s. https://esperanto.berlin/de/eo-ddr-1970), obwohl der Verfasser des Artikels sehr wohl Kenntnis von dem Sachverhalt hatte, aber offenbar absichtlich darauf verzichtete, das Thema miteinzubeziehen. Statt dessen stellte er mit grosser Verve die (zweifelhaften) Verdienste Blankes auf dem Gebiet der Bildung und Erziehung des sozialistischen Menschen in der DDR heraus. Bei der Lektüre dieses Beitrags fühlt man sich unweigerlich in die Zeiten der DDR-Propaganda zurückversetzt.

Für die fragliche Zeit liest man in den Stasi-Akten über Blanke mit Datum vom 26. Februar 1970 die folgende Notiz der Volkspolizei der DDR (die mit der Stasi zusammenarbeitete):

„Der GMS [d.h. Detlev Blanke] ist Mitglied der SED und vertritt konsequent die Politik von Partei und Regierung. In der bisherigen Zusammenarbeit berichtete der GMS ehrlich über die die Esperanto-Bewegung der DDR interessierenden Fragen. Der GMS gab in der bisherigen Arbeit von sich aus Hinweise über im internationalen Maßstab negativ in Erscheinung tretende Esperantisten. In der bisherigen Zusammenarbeit war der GMS zuverlässig und ehrlich. Sein Vertrauensverhältnis zum MfS ist gut.“

Auf Nachfrage beim Verfasser dieses Beitrags, warum er darauf verzichtet hatte, die Zusammenarbeit Blankes mit der Stasi zu erwähnen, obwohl er den Fall ja kennt und die Geschichte bestens dokumentiert ist, erhält man von dieser Seite folgende Antwort: Es gebe keinen Grund, das Thema zu behandeln, solange die antikommunistische Hexenjagd andauere, denn es gehe dabei gar nicht um eine ehrliche Aufarbeitung des Themas, sondern eben nur um antikommunistische Hexenjagd, bei der auf die Leiche des Opfers eingetreten werde. Eine solche seltsame Antwort illustriert die mentale Verfassung von Leuten, die dem ultra-reaktionären altkommunistischen Spektrum zuzurechnen sind, auf eindrückliche Weise. Offenbar haben sie das Bedürfnis, ihre ehemaligen Genossen in Schutz zu nehmen und deren Zusammenarbeit mit der Stasi zu verschweigen (so wie es ja auch in Kreisen der Partei DIE LINKE üblich ist).

Man kann also abschliessend beobachten und feststellen, dass in der ganzen UEA-Bewegung und darüber hinaus diese Geschichte systematisch und beharrlich verschwiegen wird. Diese irrationale und unehrliche Haltung verhindert natürlich jegliche kritische Aufarbeitung der Geschichte der Esperanto-Bewegung, die somit auf dem Niveau der märchenhaften Legendenpropaganda verharrt (selbst wissenschaftliche Werke sind von dieser Krankheit betroffen), deren einziges Ziel und einzige Absicht es ist, das unwissende Publikum zu täuschen. Diese wendet im Prinzip dieselbe Strategie an, die schon die Kommunisten des Sowjetblocks anwendeten: Alle hauseigenen Probleme eisern verschweigen, die dem eigenen Ruf schaden und die Partei diskreditieren könnten, jegliche Kritik von innen und aussen zurückweisen, bei Kritik von innen und aussen die Dinge und den Spiess umdrehen. Diese schlaue Strategie wird angewendet, um sich und die eigenen Genossen vor „Verleumdung“ zu verteidigen, obwohl diese Leute wissen, dass sie falsch und lügnerisch ist.

So kann man davon ausgehen, dass die Zusammenarbeit Detlev Blankes alias „IM ulo“ mit dem Ministerium für Staatssicherheit der DDR noch länger von der Esperanto-Bewegung verschwiegen werden

wird. Der Grund ist wahrscheinlich, dass man sich a) schämt, den Sachverhalt zuzugeben, dass Blanke ein langjähriger Spitzel und Komplize der Stasi gewesen war (bekanntlich taten sich die Kommunisten immer schwer, eigene Fehler zu bekennen), und b) dass man die Ehre einer der verdienstvollsten Ikonen der Esperanto-Bewegung nicht mit Dreck besudeln möchte. Dies gilt vor allem für die deutschen Esperantisten sowie auch für die führenden Leute der UEA, dessen Ehrenmitglied Blanke war, ohne dass man wusste, dass er ein Agent der DDR-Stasi gewesen war (obwohl man es, wie gesagt, vermutet hatte). Dass Blanke im Namen des SED-Regimes und mit Mitteln der Stasi die Freiheit der Esperanto-Bewegung in der DDR systematisch unterdrückte und ihre freie Agitation verhinderte, so dass sogar ein Bendias seufzte, hat man allerdings sehr wohl gewusst, dies aber nie kritisiert, denn man war der Meinung oder der festen Überzeugung, dass Blanke in der DDR für Esperanto „etwas Gutes“ tat. Das ist der eigentliche Skandal, oder das Spiel.

© www.plansprachen.ch, Sept. 20